



P A C O

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

apelacio

DE LA PORPACA MONDPARLAMENTO DE LA POPOLOJ

La popoloj en tutmondo estas profunde maltrankviligitaj. Neniam tiel akre oni sentis danĝeron de nuklea mondmilito.

Plimultigo de nuklearmiloj kaj akumulo de mortarsenaloj atingis sortodecidan limon. Daŭrigo de tiu ĉi proceso venigas la homaron al danĝero de neniigo.

La „nova nuklestrategio“ prezentas insidan trompon por la popoloj. Oni provas ilin konvinki, ke estas eble realigi limigitan aŭ lokan nuklemliton, kiu ne transformiĝus en ĝeneralan nuklekatastrofon. Ni malakceptas kategorie tiun danĝeran kaj malhumanan doktrinon.

La popoloj de tutmondo, kiuj sukcesis per abnegacia batalo pli ol tri jardekojn malebligi flamigon de mondmilito kaj ĵordonis tiom da fortoj en la batalo por malarmado kaj sereniĝo, rifuzas estiĝikunagantoj en tiuj fiplanoj. Ili insistas pri haltigo de la pluarmado, ĉesigo de la armila tintado, de la kazoj de agreso kaj militĉantaĝo, pri forigo de danĝero de nuklemlito.

Ni apelacias al la racio kaj la sento pri respondeco de politikaj kaj ŝtataj funkciuloj kaj alvokas al la registaroj:

Rezignu pri novaj programoj de armado! Ĉesigu produktadon de ĉiuj specoj de armiloj por amasneniigado — raketnuklea, neŭtrona, ĥemia kaj ĉia alia! Malgrandigu la militrezervojn! Malpermesu la nuklearmilojn! Intertraktadon! Alia ebleco mankas.

Ni apelacias al ĉiuj, por kiuj la paco estas kara:

Hodiaŭ ne sufiĉas esprimi maltrankvilon! Ne sufiĉas alarmi! La popoloj kapablas defendi la pacon — kaj tio estas ilia ĉefa rajto! Estas necese agi!

Nia voĉo eksonu per eksterordinara forto! Ni haltigu tiujn, kiuj provas ĵeti la mondon en abismon!

Ni lasu flanken ĉion, kio malunuigas nin! Ni unuiĝu en batalo por forigo de la danĝero pri nuklea milito!

(Akceptita de 2260 partoprenantoj en la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco el 134 landoj kaj ĉirkaŭ 100 internaciaj organizaĵoj).

*24-an de septembro 1980
Sofio, Bulgario.*

ĉarto

DE LA PORPACA MONDPARLAMENTO DE LA POPOLOJ

En tiu ĉi respondeca momento, kiam la milit-danĝero abrupte plifortiĝis, en la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario — Sofio kunvenis la Porpaca Mondparlamento de la Popoloj.

2260 partoprenantoj — reprezentantoj de diversaj amasorganizaĵoj kaj movadoj, de politikaj partioj, funkciuloj de kulturo kaj scienco, de religiaj kultoj, sociaj kaj politikaj aktivuloj,

Esprimante la volon kaj la aspirojn de siaj samlandanoj de 134 landoj vivi en paco:

treege alarmite pro la malmildigo de la internacia situacio kaj pro plifortiĝanta tendenco minaci per forto, uzi blokadojn kaj psiĥologian militon venenantan la internacian atmosferon;

ekstreme maltrankviligite pro la neretenebla armado en la tutmondo kaj indignante pro malrespondeca politiko celanta ĝian pluan intensigon;

zorgoplenaj pro la fakto, ke bazaj sociaj, ekonomiaj kaj politikaj problemoj akriĝas pro impeta pligrandigo de militelspezoj;

rezulte de vasta kaj malsekreta diskutado ni atingis konsenton pri jenaj ĉefaj celoj kaj taskoj de la pacamaj fortoj en nuntempo:

I. LA PACO ESTAS NEFORPRENEBLA RAJTO DE LA POPOLOJ

Vivi en paco estas sankta kaj neforprenebla rajto de ĉiu homo kaj de ĉiu popolo. La paco estas komuna valorega propraĵo de la homaro, ĉefa kondiĉo kaj premiso por progreso.

Sociaj, ekonomiaj kaj politikaj rajtoj estus realigeblaj, nur se garantiĝus al la homo la rajto je paco, la rajto je vivo.

Ĉia atenco kontraŭ tiu sankta rajto — planado, preparo kaj komenco de milito — prezentas gravegan krimon kontraŭ la homaro.

Tiu ĉi rajto estas rompita de la aŭtoroj de la t. n. „nova nuklea strategio“, en kies fundamento kuŝas monstra doktrino pri „limigita“ nuklea milito. Nenia „limigita“, „loka“ aŭ „kontinua“ nuklea milito estas ebla. Ĝi neeviteble transformiĝos en ĝeneralan nuklean katastrofon.

La militonraj militaristoj venigis la homaron al granda minaco de nemezureble pli danĝera kaj pli ruiniga plifortigo de la vetarmado. La provoj atingi militavantagon estas ne nur sensecaj, sed ankaŭ treege danĝeraj. Ili entenas danĝeron pri la vetarmado atingi tian klavite novan nivelon, kiam ĝi estos ne plu kontrolebla.

La nuklearmiloj kaj la ceteraj rimedoj por amaseniigado devas esti malpermesitaj.

Estas necese ne allasi la nuklearmilojn en la manojn de rasistaj, diktatoraj kaj aliaj reakciaj reĝimoj. Oni devas forigi tiun ĉi minacon por sendependeco de najbaraj ŝtatoj kaj por la mond-paco.

Plej grava tasko hodiaŭ estas ĉesigi la vetarmadon. Nuran vojon por brido de la vetarmado prezentas la intertraktadoj bazitaj sur severa observo de la principo de egaleco kaj sama sekureco. Alia ebleco ne ekzistas!

Por ke estu garantiita tiu rajto je paco, ni insistas:

— senprokraste ratifiki kaj validigi la kontrakton SALT-2, daŭrigi la intertraktadon por plulimigo de la strategiaj armiloj;

— senprokraste komenci intertraktadon pri la nukleaj armiloj kun mezdistanca efiko, inkluzive al la avancigitaj sistemoj;

— samtempe malfondi ĉiujn militaliancojn inkluzive al la Varsovia Pakto kaj NATO kaj forigi ĉiujn eksterlandajn militbazojn;

— restarigi la konfidon inter la ŝtatoj, kiu dum la 70-aj jaroj puŝis senteble antaŭen la sereniĝon.

Granda respondeco pezas sur la partoprenantoj en la Madrida Renkontiĝo de reprezentantoj de la ŝtatoj subskribintaj la Finan Akton en Helsinko, alvokitaj agi en tiu ĉi spirito kaj kontribui pozitive por atingo de tiuj ĉi celoj. Aparte gravan signifon havus akcepto de konkreta decido pri kunvoko de konferenco pri milita sereniĝo kaj malarmado de Eŭropo.

II. LA RAJTO JE PACO ESTAS RAJTO JE NACIA SENDEPENDECO, LIBERA KAJ PACA DISVOLVIGO DE ĈIUJ POPOLOJ

La popoloj deziras daŭran kaj justan pacon, kiu garantius al ili plenan rajton elekti sian propran vojon de disvolvigo kaj starigi socian-politikan sistemon laŭ siaj deziroj. Politiko celanta senigi la popolojn je tiu rajto estas imperiisma politiko. Ĝi kontraŭas al la natura marŝo de la historia progreso kaj estas reakcia laŭ sia esenco.

Ĉiuj popoloj devas havi egalajn eblecojn por socia-ekonomia disvolvigo.

Natura rajto de ĉiuj popoloj estas forigo de ĉiuj formoj de diskriminacio, de ĉiuj artefaritaj baroj en la internacia komerco, ĉiuj formoj de malegaleco, diktado kaj ekspluatado en la ekonomiaj interrilatoj kaj ties transformiĝo sur principojn de justeco kaj egaleco.

La politiko de malstabiligo de la progresaj reĝimoj en la evoluantaj landoj fakte prezentas agreson efektivigatan per psiĥologiaj, ekono-

miaj, politikaj kaj aliaj metodoj inkluzive al armita interveno. Tio estas rompo de la rajto je paco.

Estigo de fajrujoj de streĉeco minacas sekurecon, liberon kaj sendependecon de popoloj en diversaj regionoj de la mondo. Samtempe ĝi stimulas la vetarmadon, venenas la internacian atmosferon kaj subfosas la sereniĝon.

Interveno en internajn aferojn de aliaj landoj prezentas gravan rompon de la rajto de ĉiuj popoloj je paca, libera kaj sendependa disvolviĝo.

La nuna plifortigo de la internacia tensio prezentas evidentan recidivon de la malnova imperia politiko de monda superrego. Tiucele oni deklaras diversajn mondregionojn „zonoj de vivgravaj interesoj“, oni estigas „korpuson por urĝa reago“, kio minacas la pacon, la nacian sekurecon kaj la liberon de popoloj.

Manko de efektiva progreso en estigo de nova internacia ekonomia ordo estas rezulto de maldeziro de la imperiismaj ŝtatoj kaj de multnaciaj monopoloj rezigni pri sia privilegia situacio, kio montriĝis nedisputeble en la lasta Speciala Sesio de la Ĝenerala Kunveno de UNO pri la problemoj de disvolviĝo.

III. SERENIGO, DEMOKRATIO, LIBERECO KAJ SOCIA PROGRESO

„Malvarma milito“, malamika kontraŭago kaj milithisterio malhelpas la socian progreson de la homaro kaj plej kompletan efektivigon de la bazaj rajtoj kaj liberoj de la homo. Ili estas profitaj nur por tiuj fortoj de la reakcio kaj agreso, kiuj pliriĉiĝas per armilproduktado.

Konstanta pligrandigo de la militelspezoj impuŝigas al la laboruloj. Ĝi kaŭzas galopantan inflacion, pligrandigon de la impostoj, senlaborecon. La sperto pruvas, ke la militigo de la ekonomiko ne nur ne pligrandigas, sed male - malgrandigas la nombron de la laborlokoj, kaŭzas malgrandigon de la elspezoj por sanprotekto, klerigo, kulturo kaj aliaj sociaj bezonoj.

Oni devas meti finon al la krima negocado far la produktantoj kaj komercistoj de armiloj. Transiro de la militproduktado al paceloj estas praktike ebla, ekonomie favora kaj absolute necesa.

Ekzisto de rasismaj reĝimoj kaj faŝismaj diktaturoj krude premanĝas la demokration, la elementajn rajtojn kaj liberojn de la popoloj prezentas ofendon al la homa konscienco. La militarismo kaj la internacia streĉeco estigas favorajn kondiĉojn por efektivigo de antidemokratiaj puĉoj, por ke faŝistaj huntoj kaj kontraŭpopolaj diktatoraj reĝimoj restu regantaj.

Ardigo de milithisterio kaj flamigo de propagandkampanjoj en spirito de malamikeco, suspekto kaj malfido al aliaj landoj kontraŭas al la interesoj de ĉiuj popoloj. La amasinformiloj devas servi al la paco kaj ne al la interesoj de la militindustriaj kompleksoj, devas ne disvastigi mensogojn kaj misinformi la publikan opinionon.

Ĉiuj havantaj respondecon pri edukado kaj formado de la karaktero de la nuna kaj la estontaj generacioj devas aktive planti la idealojn de paco, amikeco, solidareco kaj respekto al ĉiuj popoloj.

IV. PACO ESTAS NIA KOMUNA PRAVA AFERO

La milito ne estas neevitebla! La paco povas esti konservita kaj fortikigita! Sed nek unu lando, nek unu popolo, nek iu ajn partio aŭ organizaĵo povus solaj atingi tion. Nur nia komuna batalo povas fiaskigi la kriman konspiron kontraŭ la pacon. Alia vojo ne ekzistas!

Volu nenio nin dividi en la komuna batalo por vivo de la homaro! Volu plenforte montriĝi la potenco de la socia opinio, por haltigi tiujn, kiuj puŝas la homaron ĉiam pli proksimen al la nuklea abismo!

Volu, ke la voĉo de la popoloj por paco trasonu pli forte ol ĉiam ajn en amasdemonstracioj, deklaroj, apelacioj al parlamentoj kaj registaroj, en solidara agado de nacia kaj internacia skalo!

Estas tempo, ke ĉiuj laboruloj, kies manoj kreas la bonaĵojn de tiu ĉi mondo, diru sian gravan vorton defende al la paco kaj la estonto de la homaro!

Ni subtenu la klopodojn de tiuj registaroj, kiuj gvidate de racio, realismo kaj bona volo batalas por sereniĝo kaj malarmado!

Ni subtenu la klopodojn de la Movado de Neangaĝitaj Landoj kiu havas grandan antiimperiisman forton kaj ludas ĉiam pli aktivan rolon por konservo de la mondopaco!

Ni subtenu la iniciatojn de UNO kaj aliaj interregistaraj organizaĵoj por brido de la vetarmado, por fortikigo de la paco kaj la sekureco de ĉiuj popoloj, por estigo de nova internacia ekonomia ordo! Ni strebos efektivigi la rekomendojn de la Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UNO pri malarmado kaj kontribui por kunvoko en plej proksima tempo de monda konferenco pri malarmado!

Jaro 1981 devas estiĝi startoplaco de decida ofensivo de la pacamaj fortoj dum la 80-aj jaroj por certa brido de la vetarmado!



Delegitaro de MEM

NE BATALI KONTRAŬ VENTMUELEJOJN

Loka finnlanda gazeto publikigis opiniojn de legantoj pri civilservado. Unu el ili skribis: „Mi ne povas mortigi finnon nek fremdulon, nek eĉ minaci, eĉ se iu ordonus. Do mia solvo estis civilservado.“ Kaj li aldonis: „Mi laboris en hospitalo. . .“ Alia substrekis, ke „en civilservado oni strebas ordinare surbaze de religiaj aŭ konsciencaj kaŭzoj. Ekzistas ja viroj kiuj ne mortigas eĉ bruton. En milito oni bezonas ankaŭ civilservantajn virojn por prizorgi taskojn de la viroj komandantajn ĉe la fronto“. Alia asertis: „Militecigo sufoke efikas je sana evoluo. La armiloj ne aŭskultas la voĉon de racio kaj justo, sed tiun de la posedanto. Ni pripensu la eventojn de Ĉeĥoslovakio, Vjetnamio aŭ Afganio. Se ni ne aktive batalas kontraŭ militarismo, ni kunhelpas la daŭrigon de tiuj maljustaĵoj.“ Mi trovis ankaŭ aludon al la „ludo de iuj grandpotencaj gvidantoj“ (kiuj?) rigardataj kiel la solaj, kiuj povas decidi pri milito aŭ paco. Kaj tiun aserton, ke „la politikistoj faras multon pro siaj propraj povointereseoj (. . .) ĉar ili havas je sia dispono obeemajn soldatojn“.

Kiel bela estus nia mondo se ĉiuj homoj obeus al la ordono — ĉu Dia ĉu konsciencia: „Ne mortigu!“ La aktiveco de la pacdefendantoj kondukas al ia supera civilizacio, kiam neniu plu povas, nek deziros, ĵeti popolojn kontraŭ aliajn, kiam paco ne plu estos simpla paŭzo inter du militoj, sed serena kunlaboro, kunvivado kaj kompreno inter ĉiuj popoloj senescepte. Sed la vojo estas ankoraŭ longa kaj plena je faligiloj!

La ĉi-supraj citaĵoj fakte ne respondas kontentige al la aspiroj de la popoloj al paco. Ili aŭtoroj certe malamas militon, sed ili skribis kvazaŭ ĝi estus nekuraĉebla malsano de la Homaro. Ili elvokas religiajn kaj moralajn motivojn por pravigi civilservadon, sed unu diras: „Mi laboris en hospitalo. . .“ kaj alia senhezite substrekas ke en milito „oni bezonas ankaŭ civilservantajn virojn. . .“ Alidire, „Mi ne mortigos“, sed aliuloj tion faru, se ili volas, mi nur. . . kunlaboros. Ĉu tio estas tre. . . morala?

La sekvaj citaĵoj faras amalgamon inter la eventoj en Ĉeĥoslovakio, Vjetnamio kaj Afganio, metas en la saman sakon „militarismon“, „la politikistojn“, „la grandajn potencojn“, kiuj havas je sia dispono „obeemajn soldatojn“. . . Bedaŭrinde tiuj trosimplaj ĝeneralaĵoj spegulas mankon de seriozaj informoj kaj analizoj pri la mondaj eventoj, ili nenion klarigas kaj neniel bremsas la agadon de la veraj militinstigantoj. Mi eĉ opinias, ke se la popoloj ne komprenus ĝustatempe de kie

venas militminaco, tria mondmilito riskus fariĝi neevitebla, kun la eventualo, ke ĉi-foje ne restus postvivantoj por tiri la lecionojn de tiu dramego!

La menciita enketo montris civilservadon ĉefe kiel individuan rifuzon de militservado, sed ne kiel rimedon por malhelpi novan militon. Krome, ĝi publikigis opiniojn, kiuj spegulas tre gravajn konfuzojn pri la pacproblemoj, pri la realaj kaŭzoj de la konfliktoj, kaj tute ignoras la karakteron kaj la terurajn sekvojn de eventuala mondmilito. Do, vole nevole ili kontribuas „malmobilizi“ la popolojn fronte al la nuntempa kurado al morto.

Tia konfuzo ne estas finnlanda specialaĵo. En la Japana kajero de „PACO“ 1980 responde al la albumo pri Hiroŝima-Nagasaki, franca esperantisto skribis jenon: „En nia lando bedaŭrinde la homoj (ĉu ĉiuj? — mia noto) estas indiferentaj, kaj pli interesigas pri la estanteco ol pri estonteco, ili egoiste ĝuas la vivon sen atenti pri la armiloj forĝataj ĉirkaŭ ili kaj la politikistoj ankaŭ grave kulpas kontraŭ la paco. Iuj ĝojas, ĉar la usonanoj posedas atombombon, dum aliaj same ĝojas, ĉar la rusoj ankaŭ ĝin havas. Do la tasko eduki ilin tiurilate fariĝas malfacila.“

Multegaj veraj pacdefendantoj, kaj ankaŭ multegaj laboruloj kun malfacilaj viv- aŭ labor-kondiĉoj, senlaboruloj, junuloj sen iu ajn perspektivo povos kiel insulton senti la aserton, ke ili „egoiste ĝuas la vivon!“ Sed la esenca afero kuŝas en tio, ke tie ĉi ni retrovas la amalgamon de la antaŭaj citaĵoj el Finnlando. Sidante sur sia nuboj, la aŭtoro ĉi-foje kondamnas la tutan mondon krom sin mem, sed samtempe prezentas totalan ignoron de la historio, de la mondaj eventoj kaj ties signifo.

Ĉu ni devas miri? Oni permesu al mi ĉi tie personan opinion. La freneza imperiista kampanjo kontraŭ komunismo, kontraŭ ĉiuj landoj, kiuj ne cedas al la ordonoj de Usono kaj ties aliancanoj, havas almenaŭ du celojn: 1. Delogi la laborulojn de batalo por nova pli justa socisistemo, asertante ĉiutage, ke la ekonomia situacio, se malbona en la kapitalisma mondo, estas katastrofa aliloke. En malnova opereto oni kantas: „Certe ne valoris ŝanĝi la registaron. . .“ 2. Akuzi Sovetunion pri intenco formanĝi la „liberan“ mondon, por pravigi siajn militpreparojn. Necessa korolaro de tiu ĉi sistema misinformado de la koncernaj popoloj estas evidente silento pri la multegaj porpacaj gestoj kaj proponoj de la socialismaj landoj kaj pri la nemezureblaj kri-

moj de imperiismo en preskaŭ ĉiuj mondpartoj, krimoj faritaj por trudi la leĝon de kelkaj miliarduloj, la leĝon de transnaciaj kapitalistaj socioj al la cetera mondo. Radio, televido, gazetaro senĉese mensogas, asertas, sugestas, aludas, kaj fabrikas fabelojn pri Kubo, Afganio aŭ Polio, sed silentas pri la neofaŝistaj krimoj sub usona okupacio (Koreo) aŭ imperiista helpo (Sudafriko, Salvadoro, Honduraso, Ĉilio, Gvatemalo, Izraelio k. t. p. . .). Se mankas iu varo en Moskva magazeno, tio „pruvas“ la fiaskon de socialismo. Sed estas preskaŭ 7 milionoj da senlaboruloj en okcidenta Eŭropo, kaj tio pruvas nur ke tie la vivnivelo de la laboruloj estis tro alta!

En tia etoso, neinformitaj aŭ misinformitaj homoj facile venas al la konkludo, ke politikado ĝenerale ne estas interesa, kio ne malhelpas ilin elekti deputitojn, kiuj subtenas la imperiistan politikon. . . Kaj kiam defendo de paco tuŝas konkretajn problemojn kaj serioze analizas la tutmondajn eventojn por esti efika, ĝi evidente parolas lingvaĵon nekutiman al tiuj homoj kaj estas rigardata kiel „komunista“ propagando. Eĉ en iu MEM-bulteno mi legis opinion de du pacamikoj, ke MEM estas organizo kuniganta „ĉefe komunistajn pacemulojn, kiuj difinas la kondiĉojn por paco laŭ komunistaj analizoj“. Sendube la konsisto de nia movado, la relativa potenco de niaj sekcioj en socialismaj landoj, la apero de naciaj n-roj de „PACO“ preskaŭ nur en socialismaj landoj — kiuj kompreneble spegulas ties pozicion pri la pacproblemoj — povas doni tiun impreson, ke nia MEM estas esence „komunista“. Sed tio ĉefe montras, ke efektive en socialismaj landoj oni ja defendas pacon, dum en la t. n. „Okcidento“ la batalo de la pacdefendantoj estas tre malfacila kaj prisilentata de la granda gazetaro, radio kaj televido. En nia centra organo „PACO“, en niaj konferencoj, ni fakte provas diri tutsimple la veron, evitante kio povas dividi niajn pacamikojn, laŭ la ora regulo de la pacmovado. Sed ni havas firman pozicion antiimperiisman, ĉar la popoloj, kiuj volas vivi suverene kaj libere ĉiam renkontas sur sia vojo la intrigojn de imperiismo, ĉar ĝuste de tiuj intrigoj venas la danĝero por la mondopaco.

Ni rifuzas batali kontraŭ ventmuelejojn. Efi-keco en la pacbatalo postulas, ke la popoloj kontrolu kion oni diras al ili, ke ili ne lasu sin fanatikigi por maljustaj aferoj. Tio koncernas ĉiujn homojn sur nia planedo, eĉ kaj ĉefe se ili ĝis nun ne ŝatas kaj ne komprenas „politikadon“, ĉar la viktimoj de nova konflikto estus iti. Sed tio eblas nur se, kontraŭe al la burĝa gazetaro, oni ne ignoras iujn vortojn kaj ilian signifon, nome: kapitalismon, neokolonismon, neofaŝismon, rasapartigon, CIA, malarmadon, pacan kunvivadon, k. t. p. . .

W. Gilbert (Francio)

Nikolaj Entelis

SOVETA DANGERO

En densa haladzo je milit-maniero ili kriadas, ili kriadas:

„Soveta danĝero!“

Por ne refuti ni diri tendencas, ke ĉiuminute vin ni atentigas: per nia marŝo orkestra, gaja, entuziasmiga kaj festa, por fari sturmon stelan per raketoj en kosmon belan, por descendigi artistojn, akrobatojn, muzikistojn, por krei diversajn aparatojn por la Olimpiado kaj trejnadaj; ni minacas por atako bonkoreca, paca, varma, amikeca. Ĉu tial, en iuj kapoj, en tia maniero, enstopiĝis kiel splito „Soveta danĝero“?

El la rusa: K. Istomin

TRADUKISTO URGE SERĈATA. . .

Por la libro de mia vivo, kies parton grandan kunverkis kvar militoj: du mondaj, du landaj, mi serĉas tradukiston, kiu tuj sen laco traduku homan sangon en porhoman pacon.

Li traduku en floraromon venenigan gasodoron ĉirkaŭantan la patrinon en ŝia lasta horo. Neelserĉeblaj tomboj de junaj gefratoj en arbkovritajn montojn estu tradukataj.

En muzikon belsonan — ĝemoj de infanoj per bomboj frakasitaj sur gepatraj manoj. Militon kruelan, danĝeron minacantan en milgorĝan kriegon li traduku — porpacan. Al tiuj, kiuj per atombomb' ludas li ŝtonigu la manegojn sangavidajn, krudajn,

Ili vivu, suferu, per okul' rabia rigardante la sunon, kiu pacradias sur feliĉan homaron, sur floranta tero de polus' al poluso sen militinfero.

Kaj, por ke mi ĝuu iom de l'paca beleco, li traduku maljunon mian en junecon.

M. N.

MEMORE AL LJUDMILA JEVSEJEVA

Nin trafis terura inform' senkompata sciigo funebra, sciigo turmenta: forpasis — ho ve! — poetino amata, vivplena Ljudmila talenta.

Si ŝatis la florojn, ŝi amis l'infanojn, ŝi helpis al Klubo de Latvaj blinduloj, — kaj nun. . . jam sen ŝi floras blujaj cejanoj, sun'lumos, susuros betuloj. . .

Nin kaptis la perdo ho ve! senrevena de ŝi, agantino kun koro humana, mortinta subite je sia posteno de nia movad' veterana.

Kaj fluas la larmoj pri nia Ljudmila amika gvardio sopiras angore. Si estos vivanta, ĝis kiam ni vivos, per sia belarta verkado sunbrila, ŝi restos en nia memoro! !

Antonina Tonti

ĜI ESTIS VERA ĪNFERO

Rakonto de princino Sisovat pri
la krimagoj de la Pol-Pot'a kliko.

Princino Sisovat, kuzino de la eksŝtatestro de Kampuĉio Norodom Sihanuk, estis dum regado de Pol Pot kaj Jeng Sari elpelita en provincon por devige labori same kiel plimulto da aliaj kampuĉianoj. Dum tiuj ĉi jaroj ŝi perdis edzon, tri gefilojn kaj proksimume 20 parencojn. Ili ĉiuj estis turmentmortigitaj de soldatoj de Pol Pot. Sian tragedion ŝi priskribis dum interparolo kun ĵurnalisto de la franca tagĵurnalo „Humanite“:

„Mi rakontos al vi, kion mi mem vidis kaj travivis dum la kvarjara regado de la reĝimo de „ruĝaj ĥmeroj“, de Pol Pot kaj Jeng Sari.

Foje oni diris al ni: la tuta reĝa familio devas kunveni en unu loko. Mi jam spertis, ke oni ne povas kredi la bonajn intencojn de la „ruĝaj ĥmeroj“ kaj tial mi ne plenumis la ordonon. Tiu-tage ĉiuj parencoj de mia edzo — 24 homoj — estis forveturigitaj (laŭ decido de la regoficejoj) en la provincon Kompongsom. Miaj geamikoj poste raportis al mi, ke oni mortigis ĉiujn. Per la samaj ŝarĝaŭtoj oni forveturigis ankaŭ mian avon kaj lian familion.

En septembro de la jaro 1975 oni transloĝigis min kaj mian familion al Battambang. Kiamaniere ni sukcesis kaŝi nian identecon? Kiam oni alveturigis nin al distrikto n-ro 1, tio estas ĉirkaŭaĵo de Battambang, mi ŝanĝis mian nomon. Same faris ankaŭ mia edzo kaj gefiloj. Tiamaniere mi fariĝis Li kaj mia edzo Kim.

Estis malbonŝanco por ni, ke mia edzo estis kuracisto. Ankaŭ mi iomete kulpas pro tio, kio okazis. Ĉiun fojon, kiam mi eksciis, ke iu malsaniĝis, mi petis la edzon helpi. Sed li mem klopodis ĉiam plenumi sian devon de kuracisto. Kaj ĝuste tio kaŭzis lian morton, kiam la „ruĝaj ĥmeroj“ konstatis, ke li donas helpon al malsanuloj.

En la vilaĝo, kien oni elpelis nin, vivis kelkaj inteligentaj homoj. Oni ofte forveturigis iun el ili, neniu sciis kien. Poste jam neniu eksciis pri la forveturigo. Mi antaŭsentis, ke oni iutage forkondukos ankaŭ mian edzon kaj ke mi jam neniam revidos lin. Mia antaŭsento plenumiĝis. Ĝi okazis la 8-an de aŭgusto 1976, je la 3-a matene. Alvenis por li la vilaĝestro, akompanata de tri soldatoj. Kiam mi ekvidis ilin, mi klopodis averti lin forkuri, sed estis jam malfrue.

Mi petis iri kun li. La vilaĝestro al mia peto respondis: „Ĉu vi deziras akompani lin? Bone. Sed vi bedaŭros tion.“

Ankaŭ mia plej aĝa filino, kiu tre amis la patron, decidis akompani lin. Ni iris proksimume unu kilometron, kiam ni atingis nelarĝan rivereton en ombro de mangarbo. Oni ordonis al ni halti. Mi komprenis — tio estas la fino. La edzo

ĉirkaŭbrakis la filinon kaj diris: Infano mia, estu kuraĝa!

Por mi tio estis neimageble suferplenaj momentoj. Mi rigardis jen unu, jen alian kaj sukcesis eldiri eĉ ne unu vorton. La plej aĝa soldato de la grupo ordonis bandaĝi la okulojn de mia edzo kaj forkonduki lin al la mangarbo.

Tiam mi komencis krii: vi ne rajtas!

La filino ĵetis sin al la patro, sed unu soldato batis ŝian kapon per kolbo. Ŝi falis teren. . .

Poste oni pafmortigis mian edzon antaŭ miaj okuloj. Post la unua pafo li ŝanceliĝis. Li levis la manojn al la okuloj. Li ankoraŭ vivis. Poste li falis kaj lia korpo konvulsiis. La soldatoj alpaŝis por batakceli la morton. Ĉi tiun scenon kaj tion, kio sekvas, oni malfacile povas imagi.

Oni devigis min reveni al la vilaĝo. Al mi ŝajnis, ke mi mortas. Dum iuj momentoj mi trenis min, dum aliaj kuregis. Poste mi ekaŭdis la filon, kiu restis en la vilaĝo. Tiumomente mi perdis la konscion.

La 31-an de aŭgusto mortis mia filino. Ĝi estis postsekvo de la bato, kiun ŝi ricevis de la polpota soldato.

Vi tute ne povas imagi, kiel kruelaj estis la polpotaj soldatoj. Se mi ne estus vidinta ĉion per miaj propraj okuloj, se mi ne estus atestantino de la tragedioj, apenaŭ mi kredus, ke tio estas ebla. Siatempe mi spektis filmon pri hitlerismaj koncentrejoj. Mi opiniis, ke io simila tute ne povus vere okazi, ke tio ne estas ebla. Dum la reĝimo de Pol Pot similajn teruraĵojn travivis mi mem. Kun tio oni ne povas paciĝi. . .

NE LASU ESTI

MORTIGOTA. KIM DE-JUNG!

La milita tribunalo de Korea Respubliko kondamnis al morto s-ro Kim De-Jung, ekskandidato por la prezidento.

Estas klara, ke la juĝo estas por preni leĝan formon por mortigi lin, unu el la kontraŭuloj de milita faŝismo.

Ni apelacias, ke vi, en via lando per via maniero kaj rimedo, donu manojn por savi lin al la kondamno. Ankaŭ la faŝistoj urĝas la ekzekuton!

Japana Pacdefenda Esperantista Asocio (JPEA)

Korea Esperanto-Asocio en Japanio (KEAJ)

JPEA, 6e Kurita, Sakuragaoka 1209-98 Yata Misima, 411 Japanio

KEAJ, Shimori 2-7-10, Asahi-ku, Osaka, Japanio



La Japana Pacdefenda Esperantista Asocio (JPEA) kaj la Korea Esperanto-Asocio en Japanio (KEAJ) eldonis tiun ĉi alvokarton defende al la viktimo de la sudkoreaj faŝistoj Kim De-Jung, ekskandidato por prezidento, kondamnita je morto.

Kiam mortis ceteraj du miaj filinoj pro malsato, mi decidis forkuri el la tendaro. Ni sukcesis alveni al distrikto n-ro 4. Tiam restis al mi nur mia filo. En iu vilaĝo mi bonŝance trovis la homon, kiu kompatis nin kaj ĉe kiu ni trovis rifuĝejon. Tie ni vivis ĝis oni liberigis nin. . .

Lastjare en marto ni revenis Pnompenon. Tie mi renkontis multajn, kiujn ni konis aŭ vidis dum la deviglaboroj. Ni ne havas sufiĉe da rizo, sed ni nun havas esperon. . . Kiam ni vidas vjetnamajn kamaradojn, kiuj estas en nia lando por helpi al ni, ni sentas grandan dankon por ilia helpo.

Mi konas suferadon, kiun travivis kaj travivas nia popolo. Dum regado de Pol-Pota reĝimo mi perdis edzon kaj gefilojn. Nun mi vivas, kredante ke mi povas batali por la feliĉo de nia nacio. Celo de mia vivo estas helpi al mia nacio.

Kiam mi vivis en la tendaro, mi ofte meditis, ĉu ankoraŭ ekzistas iu espero pri feliĉo. Mi vidis homojn, kiuj devige laboris kiel sklavo, kiel brutoj, kaj kun teruro mi demandis min mem: Ĉu oni havos la forton releviĝi por batali? Tiam mi decidiĝis doni ĉiujn miajn fortojn por tio, ke la reĝimo de Pol Pot neniam revenu.


Al mia demando pri la pozicio de princo Sihanuk, Sisovat respondis:

„Vi demandas pri Sihanuk. Sihanuk estas princo, mi princino. Sed niaj vidpunktoj estas tute diversaj. Jes, Sihanuk estis dum kvar jaroj kaptito de Pol Pot. Sed li vivis en sia palaco. Li ne devis travivi la suferojn, kiuj fariĝis destino de aliaj kampuĉoj. Li ne devis kiel mi laboregi sur kampoj de la tria matene ĝis la nokto por pladeto da rizo. Kaj tia fatalo trafis la tutan nacion. Sihanuk tion komprenos neniam. Li nenion scias pri la suferado de la popolo. Li diris pri nia registaro: „Ili estas junaj! Ili malfacile povas regi la landon.“ Sihanuk ne malhelpu al ili, ke ili povu vidigi sin.


Nun mi laboras en la protokolsekcio de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, daŭrigis Sisovat. Mi renkontiĝas kun membroj de la diplomataro kaj tiun ĉi laboron mi tre ŝatas. Mi ofte vizitas kun ili diversajn urbojn kaj vilaĝojn. Ni renkontiĝas kun homoj. Mi povas firme proklami: la situacio en nia lando refariĝas normala.

Se mi havos tempon, mi skribos miajn rememorojn en verko, kies nomo eble estos: „Oni saviĝis el la infero“. Jes, ĝuste tiel. Ĉar ĝi estis vera infero. Kaj ni estas tiuj, kiuj travivis tiun inferon“, diris Sisovat ĉe la fino de nia interparolo.

Esperantigis: J. Tomišek



Medalo de MPK atribuita al MEM.



En la MEM-kunveno — Stokholmo.

El la kancelario de Pawiak malgranda homgrupo ekiris direkte al Serbia. Iranta ĉe la kapo gardisto Hinz mallaŭte tintadis per ŝlosiloj. Post li sekvis la malliberuloj portantaj brankardon, la procesion fermis kvar gestapanoj. La homgrupo preteriris la murojn de Pawiak ĉe la fenestroj de ĉeloj lokitaj je la ternivelo, sur mallarĝa trotuareto el betonaj ŝtonplatoj. Por momento oni haltis ĉe la pordo kondukanta al la kelo kun granda surskribo: kadavrejo.

Jam vesperiĝis. Ĉio tamen estis klare videbla en la lumo de la grandaj reflektoroj ĉirkaŭprenantaj la terenon de Pawiak. La brankardo ekiris plue. Nur ĉe la muroj de Serbia ĝin ensorbis la densa mallumo de tiu domo endormigita per tiu ŝajna dormo karakteriza por malliberejoj. Ĝi aperis subite ĉe la pordo sub la lumo de la ampolo lokita alte super la enirejo. Sonorilo eksonis akute. La deĵoranta sekciestrino tuj malfermis la pordon kaj terure timigita senmoviĝis je la flanko.

— Hospitalen. . .

Rapide oni malfermadis la kradojn sur la etaĝoj— kaj la brankardo, inter la silento, stanfado kaj kraktintado de la armiloj ekfluis supren. La kuracistinoj ankoraŭ ne dormis. Gestapano, kiu ŝajne komandis tiun ĉi konvojon, eniris la ĉelon de la kuracistinoj kaj postulis, ke oni certigu, ke la vunditino povu fari tuj depozicion. Li eldiris tion koncize, klare kaj ordone.

Li staris apud la tablo, kiam oni faris la unuan pansaĵon. La vunditino, juneta knabino sango-makulita, ricevis kuglon en la mamon. Tio certe okazis antaŭ nelonge, maksimume antaŭ horo. Ŝi estis senkonscia. Doktorino Majewska haltigis la sangelfluon kaj metis bandaĝojn, kiuj tuj fariĝis ruĝaj. La germano malpacience kaj kolere admonis ŝin, ke ŝi ne prokrastu kaj penu rekonsciigi la arestitinon.

— Ian injekton — ŝi devas vekigi. Si devas depozicii. Schnell!

La malliberuloj forportis la brankardon kaj foriris kun Hinz, la gestapanoj dislokiĝis en la kuracista kabineto, lasante la pordon larĝe malfermita. La komandanto obstine staris ĉe la vunditino. Doktorino Majewska mansignis al Nana.

Pola Gojawiczynska — (1896—1963), tre populara pola verkistino, nomata pro sia verkaro la plej „varsovia“ verkistino de la lasta duonjarcento. En la romano „La Krado“, kiun oni unuafoje eldonis en 1945 ŝi priskribas la herocon kaj martirecon de la malliberuloj de Pawiak kaj batalantan Varsovion en la jaroj de la hitlerana okupado. La esperantigita fragmento prezentas unu el la ĉapitroj de la menciita romano.

— Ni transportos ŝin sur liton en la kvara ĉelo.

— Veki ŝin, veki! — kriegis la germano.

La kuracistino respondis mallaŭte:

— Ŝi ne dormas, ŝi mortas.

La sanstato de la malsanulino ŝajnis al ŝi senespera kaj transportante ŝin sur la liton, ŝi volis atingi nur tion, ke la gestapanoj retiriĝu de la vunditino. Laŭ la aspekto de la soldatoj, ŝi vidis, ke ili prenis sian kaptitinion en batalo dum rezistoagado, ke ili mem devis suferi homperdojn, kaj ŝi konjektis, ke krom la vundita knabino, ili kaptis neniun alian.

— Mi faros ĉion, kio dependas de mi, sed. . .

Ŝi faris signifoplenan geston per mano kaj ekrapidis al la malsanulino, kiu jam kuŝis en la kvara ĉelo. En la malgranda ĉelo la malliberulinoj jam vekigis el la unua dormo kaj, sidante sur la litoj, de malproksime atentis la novan kamaradinon. „Mi volus — diris al si doktorino Majewska — eltiri de ili ŝian nomon.“

Gardisto Hinz ĵus eniris denove la hospitalon kaj la kuracistino, kaptinte la hospitalan karton kaj kraĵonon, petis lin pri personaĵoj de la arestitino. Poste ŝi rapide skribis: — Anna Krystyna Sawicka — kaj pendigis la karton sur la litapogilo.

— Nu, kiel estas? — demandis Hinz okulmontrante la vunditinion.

— Mi timas, ke jam nenion oni povas fari ĉi tie — diris la kuracistino.

Hinz eksakris vulgare. En la kuracista kabineto la germanoj dismetis sur la skribotablo presitajn formularojn kaj unu el ili eksidinte plenigis la enkondukon de la protokolo. Oni vokis el Pawiak interpretiston. Flegistino Nana forprenis de la flamo de la primuso malgrandan sterilizilon. La grupo da gestapanoj plenigis la malgrandan ĉelon numero kvar. Doktorino Majewska kalkulis propre la pulsobatojn de la vunditino kaj senespreriĝinte per decida voĉo petis pri iom da tempo kaj trankvilo. La vunditino kuŝis senmove kun bluetaj lipoj, kun grandaj mortombroj sur la glatigita vizaĝo, kun fermitaj palpebroj. Kaj tamen. . . „Si estas konscia“ — preterrapidis la penso tra la kapo de l'kuracistino. . .

La gestapanoj restis momenton ĉe la lito, kaj vidante, ke la vunditino ne ekmoviĝis dum la injekto retiriĝis lasante unu gardostaranton. Hinz promenadis en la koridoro. Flegistino Nana estingis la plafonlumon kaj ŝaltis dormolampon kovritan per lampoŝirmilo. Duonlumo ĉirkaŭprenis la ĉelon. Ekregis silento interrompata nur de la flustrado de malliberulinoj, kiuj atentigis, ke la vunditino oni kuŝigis en la sama lito sur kiu mortis Kristina. Sed ĉu tio havas ian signifon?

Doktorino Majewska ĉiam kun la mano sur la pulso de la malsanulino, kliniĝis super la vunditino forŝovante ŝiajn harojn de la frunto. Subite ŝi eksentis sur si ŝian rigardon, rigardon plene konscian. La bluetaj lipoj ekmoviĝis.

— Ĉu vi estas polinoj? . . .

— Jes.

El la koridoro aŭdebliĝis ritmaj paŝresonoj de la promenanta Hinz. Unu el malliberulinoj saltis el la lito kaj staris ĉe la pordo. Anna Sawicka faris teruran penon, por klare eldiri sian peton.

— Ne savu min. Permesu al mi morti. Mi ne volas depozicii. — Doktorino Majewska volis nei, diri iajn kuraĝigajn vortojn, kiajn oni diras kuinte al mortantoj, sed la kuraĝo kaj volo de tiu infano postulis de ŝi la saman kondukt-mezuron.

— Kiun sciigi ekstere? . . .

Ne povante jam paroli, la vunditino respondis per rigardo:

— Ne.

Nana, tenante ŝian manon en la sia demandis ŝin komplete kaj milde:

— Ĉu vi havas neniajn dezirojn? . . . al neniu, nenion? . . . Ĉu ili kaptis vin dum rezistad-agado?

— Ni interpafadis—ekraŭkis la vunditino per ŝirita voĉo.

Doktorino Majewska donis signon al Nana kaj retiriĝis de la lito. Hinz enirante, laŭte fermis la pordon. La vunditino ŝajnis ekdormi. La kuracistino eliris en la koridoron kaj sciigis la gardostarantan gestapanon, ke la sanstato de la vunditino estas senespera, sed se okazus pliboniĝo ŝi tiuj sciigos tion al Pawiak.

— Nein — respondis li akre kaj eksidis sur la benkon en la koridoro.

Li kaj Hinz laŭte ŝtelirante ĉiumomente rigardis en la ĉelon. Doktorino Majewska kaj Nana foriris bone sciante, ke se ili restus ĉe la vunditino, oni devigus ilin al pluaj prizorgoj. La senmovaj malliberulinoj sur siaj litoj en la kvara ĉelo ankoraŭ ne dormis, ĉiam rigardante Sawicka-n kaj admirante ŝin, kiu nek postulis akvon, nek plendis pro doloro, nek montris ajnajn malfortecojn de la mortantoj.

— Eble ŝi ankoraŭ resaniĝos? . . .

La nokto pasadis. Hinz foriris al la kancelario, gestapano dormetis sur la benko. Ankaŭ virinoj en la kvara ĉelo endormiĝis kaj ekstremante ili subite vekigis kun la sento, ke ili devas maldormi. En granda silento ili aŭdis la raslan, plirapidigitan spiradon de la malsanulino.

— Mi mortas.

Ili tuj leviĝis kaj ekstaris ĉirkaŭ la lito kun instinkta penso pri Dio, pri morto, pri Mondfina Juĝo. „Eble Dio ŝin savos“ — ili pensis. — Preĝu, preĝu kun ni.

Pene kaj klare ŝi elflustris:

— Mi ne kredas. . .

Ili rigardis ŝin teruritaĵe. Tiam kvazaŭ volante klarigi, ekspliki ion al ili, ŝi eldiris ĉi lastajn vortojn implicantajn ŝian kredon: — Mi servis al la homoj. . . kaj por la homoj mi mortas. . .

Ŝi fermis la okulojn, ŝia vizaĝo enkaviĝis kaj rigidiĝis kun esprimo de granda seriozeco. La

malliberulinoj flustre interkonsiliĝis — ĉu voki Nana-n aŭ doktorinon Majewska? . . . Sed ili timis, ke tiam vekigis ankaŭ gestapano kaj eble ili turmentos ŝin per demandoj, perforte devigos ŝin depozicii. Ili interplektis la manojn.

— Permesi al ŝi tiel morti sen ia helpo! . . .

Estis io tia en la konduto de Sawicka, kio devigis al subigo kaj respekto.

— Ni preĝu por ŝi — flustris unu el malsanulinoj ne kaŝante siajn larmojn — mi pensas, ke ŝi ne koleros kontraŭ nin? Ni preĝu mallaŭte.

Ili genuis post la lito kaj komencis senvortan preĝadon ne sciante mem pri kio peti Dion en la nomo de tiu, kiu ne kredis lin. . .

Ŝi malfermis la okulojn kaj jam senspire, kovrite per mortŝvito, kun vizaĝo plena je briloj kaj tremetoj rigardis ilin kun nepriskribebla amo. Subite dum ili genuis ili eksentis, ke la mondo ĉirkaŭe ŝanĝiĝis, ke okazis io nerevokebla. De la lito iris granda silento. Ekstere jam tagiĝis, la krado de la fenestro emergis el la matenkrepusko kaj la lampo sur la tableto ŝirmita per roza papero brilis kvazaŭ pala globo. En la silento aŭdebliĝis matena pepado de paseroj en la mastruma korto. Ili leviĝis post la genuado kaj proksimiĝis al la lito. Anna Sawicka kuŝis senmova surdorse kun severa vizaĝo kaj serioza esprimo de la infana buŝo. La larĝe malfermitaj kaj mutaj okuloj ŝajnis rigardi en la grandan malplenon, kiu estis poreterna kvieto.

Eĉ post la morto la germana gardo ne forlasis la kadavron. La gestapanoj foriris nur tiam, kiam prenis la servon gardistino Schulz. Ŝi sidis pacience en la ĉelo numero kvar, atendente ĝis la mallibereja kuracisto oficiale konstatos la morton. La kvar malsanaj malliberulinoj ne povis eĉ moviĝi subpremitaj per la pezo de ŝia ĉeesto. Ili rememoris la sinsekvon de la eventoj de tiu nokto, malgraŭvole rememorante Kristinan, kiu antaŭ nelonge mortis sur la sama lito. Kristina mortis kvazaŭ forblovita lumo, kvazaŭ rompita tigo de pala kaj bela floro en la mondo plena de teroro kaj teruro. Oni pensis pri ŝi tiel kiel pri planto, pri lumo, pri poezio. Sawicka mortis kun kuglo en la brusto, per morto de soldato.

Ĉe la tagiĝo la sama brankardo malsupreniris sur la fera ŝtuparo, sur la sama vojo, sur kiu ĝi supreniris en la vesperkrepusko. Portis ĝin du malliberulinoj. Ĝis la fino postiris ilin terura kvazaŭ vulturo gardistino Schulz.

El la pola lingvo: Jerzy Banaski

Glosoj

Anna Krystyna Sawicka — (1919—1943) — fondintino kaj prezidantino de ZWN (Asocio de Junaj Batalantoj) en la tempo de la hitlerana okupado. Mortvundita en stratbatalo kaj arestita de gestapo, ŝi mortis en Pawiak.

Pawiak — malliberejo en Varsovio en la periodo de la hitlerana okupado. Ĉirkaŭ 37 mil malliberuloj de Pawiak estis murditaj en la arbaroj apud vilaĝo Palmiry, kaj ĉirkaŭ 60 mil malliberuloj de Pawiak estis transportitaj en koncentrejojn. Nun sur la tereno de Pawiak troviĝas Muzeo de la Historio de la Pola Laborista Movado kaj monumento omaĝe al la pereintaj viktimoj *rasla* — raŭka, stertora sono aŭdigata de agonianto *schnell* — rapide

Serbia — porvirina filio en Pawiak.

Parola prononco au lega prononco

Okaze de la esperantigo de etnolingvaj vortoj, du gravaj problemoj prezentiĝas. Unu rilatas al la nombro de signifoj, kiun la etimo havas. Ne estiĝas problemoj rilate etimojn kun nur unu signifo. Male, kiam ili havas plurajn signifojn, oni devas decidi, ĉu ankaŭ la Esperanta vorto havu tiom da signifoj. Elstara ekzemplo estas la vorto „kanono“, kiu laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) havas kvin signifojn:

1. pafilego;
2. eklezia regulo, koncernanta la kredon kaj disciplinon;
3. ekleziaj katalogoj de la sanktuloj aŭ de la Testamentaj libroj;
4. parto de la teksto de la katolika meso;
5. muzikaĵo, en kiu, temo anoncita de unu voĉo, estas imitata strikte de alia.

La rezulto de tiu ĉi polisemio estas, ke kelkfoje, kiam la kunteksto ne sufiĉas, frazo povas esti ambigua. Jen ekzemplo: *Li verkis libron pri kanonoj de la 17-a jc.* Tiu frazo ne estas tradukebla, ĉar ne estas eble scii, pri kiu „kanono“ ĝi temas.

Nun ni ekzameni la kontraŭan procedon, la kreadon de apartaj vortformoj por ĉiu signifo de etnolingva vorto. Jen zamenhofa ekzemplo. Li kreis tri malsamajn Esperantajn vortojn por esprimi la signifojn de la angla **point** kaj franca **point(e)**.

angla	franca	Esperanto
point	point	punkto
point	point	poento
point	pointe	pinto

La esperantaj vortoj estas konataj kiel ĝemelaj radikoj, ĉar Zamenhof formis ilin el la samaj etnolingvaj radikoj aŭ el malsamaj stadioj atingitaj de tiuj radikoj en sia evoluo. Plej ofte unu el la vortoj havas sian latinan formon kaj la aliaj la formojn, kiujn tiu latina etimo alprenis en la modernaj lingvoj. Tiel, „punkto“ devenas de L. *punctus*, „pinto“ de F. *pointe* kaj „poento“ de F. *point*.

Tiu ĉi rimedo ne ĉiam estas bona maniero krei vortprovizon, ĉar preskaŭ ĉiam la ĝemelaj radikoj havas tro similajn formojn, kaj tio kaŭzas malfacilaĵojn por lernantoj. Tiuj vortoj estas konataj kiel paronimoj. PIV difinas paronimon kiel „vorto preskaŭ samsona kiel alia, sed sence malsama.“ Unu el la plej oftaj paronimaj paroj en Esperanto estas „pesi/pezi“. Ĝi estas stumbligilo por sennombraj lernantoj, kiuj ne povas memori, kiu el la verboj estas transitiva kaj kiu netran-

sitiva. Tute ne temas pri problemoj de misprononco, ĉar la eraroj okazas ne nur en la parolata lingvo; ili estas troveblaj ankaŭ en skribaj kaj presitaj tekstoj. Estas nekredeble, ke Zamenhof lasis tiun ĉi vestigon de pra-Esperanto en Esperanto, ĉar li mem konstatis, ke tiaj paroj da paronimoj malfaciligas la lernadon de la lingvo. En etnolingvoj ofte la sama vorto povas esti uzata transitive kaj netransitive: A. *to weight* kaj F. *peser*. Ido trovis alian solvon per la uzo de du malsimilaj vortoj, kiujn oni ne povas facile intermiksi: *ponderar* — „pesi“, kaj *pezar* „pezi“. La leganto povas cerbumi pri tio, kiu el la du rimedoj estas la pli bona.

Nun ni rigardu la problemon de la ĝusta formo de etnolingvaj etimoj en Esperanto, prenante kiel ekzemplon parencajn vortojn en la angla kaj franca lingvoj.

angla	franca	Esperanto
—	traîner	treni
train	trainé	trenaĵo
train	train	trajno
to train	entraîner	trejni

La esperantaj vortoj ne estis kreitaj samtempe, sed eniris la lingvon dum malsamaj periodoj. „Treni“ estas Fundamenta vorto, plej verŝajne formita por alproksimiĝi al la prononco de la franca etimo *trainer*. „Trajno“ evidente ricevis sian formon en Esperanto surbaze de la skriba formo en la angla kaj franca lingvoj, ĉar nek en unu nek en la alia vorto aŭdiĝas la diftongo „aj“; en la angla ĝi estas „ej“ kaj en la franca la nazala vokalo „e(n)“.

„Trejni“ estas la plej freŝdata aldono al tiu ĉi grupo, kaj ĝi ankoraŭ ne estas registrita en ĉiuj nuntempaj Esperantaj vortaroj. Tiu, kiu enkondukis ĝin, volis diferencigi ĝin disde „treni“ kaj „trajno“, do li imitis en la Esperanta vorto la anglan prononcon de *train* (trejn). La rezulto estas triĝemelaj paronimoj.

Povas esti ĝi objekto, ke estas erare ŝanĝi la parolan prononcon de etnolingva vorto sufiĉe vaste konata en aliaj lingvoj, ekzemple „teamo“, kiu devenas de la angla *team* (tim). Tamen, se oni alprenas tiun ĉi vorton laŭ la fonetisma principo, oni devas skribi ĝin „timo“, kaj tio kaŭzas homonimecan konflikton kun la jam ekzistanta substantivo „timo“. Aŭ oni uzu la skriban prononcon, t. e. oni legu la fremdan vorton Esperante, aŭ oni elektu alian radikon kiel *esquadro* en Ido. Ni ne forgesu, ke Esperanto ankoraŭ estas skriba, ne parola, lingvo. Oni do lernas ĝin per la okuloj, ne la oreloj. Pro tio estas konsilinde eviti vortformojn, kiuj estas tro similaj de grafisma vidpunkto. Bedaŭrinde, ne ekzistas klare formulitaj reguloj por la Esperantigo de etnolingvaj vortoj. Zamenhof mem ne estis konsekvenca tiurilate.

Glosoj

- ambigua* — dusenca, duba
- etimo* — vorto, de kiu alia vorto devenas
- etno* — gento, popolo
- objeti* — kontraŭmeti argumenton
- PIV — Plena Ilustrita Vortaro
- polisemio* — multsignifeco

ekumena voĉo de paco

Sovetunio. La patriarko de Moskvo kaj de tuta Sovetio Pimen ricevis — okaze de sia 70-jara vivjubileo — Ordenon de amikeco inter la Popoloj, pro lia grava porpaca laboro. Kiel elstara aktivulo por paco, malarmado kaj sociala justeco li estis jam en 1963 elektita en la Mondpacan konsilantaron.

Svislando. Centra Komitato de la Mondkonsilantaro de Eklezioj kunsidis en aŭgusto 1980 en Genevo. Ĝi eldonis gravan rezolucion, atentigantan pri la enorma danĝero de la febra nuklea armado, plifortiĝinta precipe per la decido de NATO pri dislokigado de novaj nukleaj armiloj en Eŭropo kaj kaŭze de la nova usona doktrino pri la t. n. „limigita nuklea milito“, pligrandiganta la riskon de nuklea katastrofo. La rezolucio alvokas ĉiujn nukleajn ŝtatojn tuj haltigi la eksperimentojn kaj fabrikadon de nukleaj armiloj, inkluzive iliajn portilojn.

Aŭstralio. La ĉefepiskopo de Sydney, kardinalo James Freeman, instigis en radio-parolado al unueco kaj reciproka kompreniĝo inter la nacioj en la tuta mondo, dum samtempa konservado de elementaj valoroj de ĉiu nacia komunumo.

Hispanio. En Madrido okazis la VI-a eŭropa kunsido de laikoj, kiun partoprenis eĉ reprezentantoj de elstaraj eŭropaj institucioj. La madrida ĉefepiskopo, kardinalo Vicent Enrique Tarancón, tie proklamis: „Efika solidareco kun malriĉuloj kaj helpo al ili devas fariĝi karakterizo de la socio fakte homa, precipe kristana. Ekonomia malegaleco kaj aliaj formoj de diskriminacio inter la homoj kontraŭstaras la evangelian mesaĝon de amo kaj unueco. La ekonomiaj strukturoj de la kapitalisma socio kreas situaciojn de ekspluatado, ja preskaŭ sklaveco, kiuj estas tre dolorigaj kaj nekunigeblaj kun la vera kristana sento.

Bolivio. Papo Johano Paŭlo la 2-a sendis al la apostola nuncio en la ĉefurbo la Paz mesaĝon, instigantan episkopojn en Bolivio daŭrigi sian strebadon en defendado de la homaj rajtoj. La ĉefepiskopo de la Paz, Jorge Manrique Hirtardo, en publika parolado diris, ke ĉiutage atingas lin voĉoj el ĉiuj partoj de la lando, kriptantaj je helpo kontraŭ agoj de malrespektado de homaj rajtoj, precipe en la ministaj regionoj, kie la situacio

estas plej terura. Plue li proklamis, ke la bolivia popolo vivas en medio de timo kaj akre kondamnis senkaŭzajn arestojn kaj murdojn fare de la faŝisma armea ĥunto. La boliviaj episkopoj eldonis komunan alvokon, postulantan, ke Bolivio revenu al la konstitucia reĝimo kaj respektado de la homaj rajtoj.

Francio. La ekleziaj reprezentantoj en Francio eldonis komunan proklamon kontraŭ la teroro en Salvadoro kaj Gvatemalo, kie oni malrespektas la homajn rajtojn, kaj kontraŭ liverado de armiloj en tiujn ĉi landojn. Kristanoj en Usono estas instigataj interveni ĉe ilia registaro kaj akcenti ĝian respondecon pri okazaĵoj en tiuj ĉi landoj.

Britio. La tutŝtata agadkomitato de la britaj sindikataj organizoj de la kristana laboristaro, reprezentanta 150.000 laboristojn, sendis alvokon al la brita registaro postulantan rezigni planojn je nuklea armado de la brita armeo.

Aŭstralio. La aŭstralia katolika helpo kaj la Societo de santka Vinceno el Paŭlo eldonis alvokon por materia helpo al loĝantoj de afrikaj landoj Etiopio, Kenjo, Somalio, Sudano, Ugando, suferantaj pro sekeco, militokazaĵoj kaj migrado de forkurintoj. Tiacele estis jam kolektita unu miliono da dolaroj.

Meksikio. En la nordamerika vikaria distrikto Tatakumara lokaj industriistoj minacas ok miŝiulojn, kiuj defendas la ekspluatatajn indianojn. Episkopo Llagono proklamis pri tiuj ĉi pastroj: „Ili konsekvence plenumas sian pastran mision, kondamnante pekon, kiu trapenetris ekonomion kaj politikon.“

Gvatemalo. La gvatemala katolika pastraro petas efikan helpon kontraŭ la enlanda terora reĝimo. Episkopo Juan Gerardi, el diecezo Quiche, vizitis Vatikanon por informi tie papon Johano Paŭlo la 2-a pri la nejustaj cirkonstancoj en lia patrujo, precipe ankaŭ pri persekutado de pastroj.

Ĉilio. Arkiepiskopa ordinariato en la ĉefurbo Santiago de Chile energie protestis kontraŭ perforta polica traserĉo de du preĝejoj kaj aresto de la laborista aktivulo Alejandro Rojas, kiu serĉis azilon en preĝejo. Episkopo de Santiago de Chile prave rifuzis transdoni lin al la polico, ĉar ne estis prezentita arestordono pri li.

Argentino. La Kristana popolpartio en Argentino kondamnis la armean puĉon en Bolivio, karakterizante ĝin kiel malrespekton de la popola volo, esprimita en la balotado.

Sudafriko. La ĝenerala sekretario de la Sudafrika Konsilantaro de Eklezioj, la anglikana episkopo Desmond Tutu, kondamnis la blankulan rasisman reĝimon kaj deklaris sin por ĝia inter-

nacia ekonomia bojkoto. Samtempe li rifuzas plenumi la antaŭkondiĉojn — prezentitajn de la prezidanto de la sudafrika registaro Botha — por la traktado kun la konsilantaro de eklezioj.

Zimbabve. La iama reĝimo de estinta Rodezio estis kondamninta la episkopon de urbo Umtala, Donal Lemont, kiel kontraŭulon de rasismo, al 10 jaroj de devigaj laboroj kaj poste — antaŭ 3 jaroj — estis ekzilita lin el la lando. La registaro de la liberigita lando, nomata nun Zimbabve, invitis lin reveni en sian diecezon. Grava satisfakcio por li.

Aŭstrio. La prezidanto de la aŭstria katolika Karitato, prelato Unger, energie protestis kontraŭ aŭstria eksporto de armiloj, precipe en tiujn landojn, kie la regantaj reĝimoj pafas en propran loĝantaron. Li proklamis kiel mokon al la demokratio, se tiu ĉi eksporto estas motivata per la peno garanti tiamaniere laborokupatecon en la propra lando. Sur la ĉefplaco de urbo Steyer (Stajer), en kiu oni fabrikas tankojn, la katolika junularo manifestaciis kontraŭ ilia eksporto al la latinamirekaj landoj, regataj de faŝismaj hundoj.

Britio. La brita registaro nuligis en julio 1980 la embargon de eksporto de armiloj. La plej alta reprezentanto de britaj katolikoj, arkiepiskopo

de Westminster, kardinalo Basil Hume, protestis perletere ĉe la brita registaro kontraŭ liverado de britaj armiloj al Ĉilio.

Usono. La episkopoj de Arizono James Rausch el Phoenix kaj Francis Green el Tucson protektas rifuĝintojn el Salvadoro, travivantajn teruran vojaĝon tra la arizona dezerto dum fuĝo el ilia patrujo en Usonon. Arizonaj katolikoj donis al la savitaj salvadoraj forkurintoj helpon je valoro de 50.000 dolaroj. La tragika morto de 13 rifuĝintoj pro soifo kaj elĉerpiĝo iniciatis klopodon de diversaj organizaĵoj pri ŝanĝo de la nordamerika leĝo pri enmigrintoj.

Vatikano. Okaze de la 1500-jara naskiĝjubileo de sankta Benedikto, patrono de Eŭropo, papo Johano Paŭlo la 2-a eldonis apostolan leteron, kiu karakterizas lin kiel heroldon de paco.

Glosoj

embargi — malpermesi elveturon de ŝipo

enorma — grandega

satisfakcio — eblo dueli personon, kiu ofendis



NGUYEN TRAI, UNU EL LA PLEJ BELAJ FIGUROJ DE LA VJETNAMAJ HISTORIO KAJ LITERATURO

re cen zoj

Ĉe ni oni daŭre asertas, ke Esperanto estas mirinda ilo por konatiĝi kun fremdaj kulturoj, precipe kun tiuj de la malgrandaj foraj popoloj, kiuj ne estas alireblaj pere de tradukoj al aliaj lingvoj. Interparoloj kun respondeculoj de Libro-Servoj (statistikoj bonŝance ne ekzistas) montras tamen, ke niaj samlingvanoj tre ofte preferas legi en Esperanto tradukojn de verkoj, kiuj jam estas konataj al ili. Tiel klariĝas ekzemple, la preskaŭ tuta manko de vendoj en Eŭropo de esperantlingvaĵoj eldonitaj en Japanujo aŭ en Suda Ameriko. Persone mi ankaŭ ofte spertis, ke nur malmultaj esperantistoj venus al la decido aĉeti vjetnaman libron aŭ ankaŭ nur estonan poezi-kolekton. Ĉiu leganto eltiru siajn konkludojn.

Ĉi tiu lasta eldonaĵo de niaj vjetnamaj kunbatalantoj meritas, laŭ mi, pli da atento ol ĝi ricevos. Unuflanke la lingvo perfekta (krom kelkaj neologismoj — ankaŭ vjetnamaj poetoj estas ja poetoj!). Aliflanke la enhavo malkovras unu el la plej interesaj periodoj de la vjetnama historio. Temas pri venko de la nacia vjetnama armeo kontraŭ nordaj invadintoj. Ne necesas klarigi, kial vjetnamoj daŭre revenas al interesiĝo pri tiaj historiaj periodoj.

La personeco de Nguyen Trai elstaras el la leteroj, kiujn li verkis, en tre trafa maniero, kaj oni ne scias ĉu admiri plie lian saĝan diplomatecon aŭ lian flaman koleron.

Renato Corsetti

Pluraj aŭtoroj. Ruĝa Rivero-Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1980, paĝoj 100, prezo neindikita.

SARKASME KAJ ENTUZIASME eseo de Miyamoto Masao

Legante tiun libron, mi unue elreviĝis: male de la titola promeso, ĝi entenas nek viglajn sarkasmojn nek varman entuziasmon. Plie, ĝi estas ne eseo, sed sinsekvo de artikoloj pri diversaj temoj: recenzoj, konsideroj pri la recenzista laboro, primovadaj temoj, studo pri la esperanta literaturo en Japanio, ktp. Mi kelkfoje

stumblis ĉe nekomprenataj sigloj (K. L. E. G., I. P. E. ktp) kaj ĉe esprimoj kiel „paneŭropa“ (pli fundamente, pli PIVe, mi skribus „tuteŭropa“). Sed iom post iom, mia atento estis kaptita de unu temo, kiu revenas plurfoje sub diversaj vestoj: arda pledo por pli granda internacieco, ne de Esperanto, sed de la esperanta kulturo.

Certe eŭropa lingvo Esperanto ne estas: se la vorttrezoro estas precipe latin-german-slava, la strukturo (pro ĝia aglutina karaktero, kiel ĉiu scias) estas ege pli proksima al la ĉina aŭ al la japana lingvoj, ol al la latina. Sed temas ne pri la lingvo, temas pri la kulturo. En trafa artikolo pri la PIV, la aŭtoro rimarkigas la mankojn de tiu vortaro, mankojn kies pleja parto koncernas la azian kulturon. Se en la PIV oni trovas Tudoro, Habsburgoj, Merovidoj (okcident-eŭropaj dinastioj), oni vane serĉus ĝou, Han, Tang, Ming (ĉinaj dinastioj); PIV konas la Larojn (romanaj dioj), sed ignoras Amatrasan (japana sun-diino). Ne kredis, ke Miyamoto kritikis esejn aŭ malame la PIVon; ĉi lasta nur reflektas la ĝeneralan spiriton, kiu regas en Esperantio, kaj estas vere, ke ĝi estas eŭropeca, tre bedaŭrinde. En pluraj el miaj esperantaj vortaroj (kaj mi havas multajn) oni trovas la eŭropan insulon Korsiko, kiu ampleksas nur 8700 km, sed neniu el ili mencias

la japanan insulon Sikokuo (19000 km). Centojn da tiaj ekzemploj mi povus listigi. . .

Kaj tio pravigas la pledon de Miyamoto Masao, ke nia lingvo ne restu sole en sia eŭropa getto.

André Cherpillod

LA APOSTOLO DE LIBERO*

Dum sia 40-a kongreso okazinta en julio en la sudbulgara antikva urbo Plovdiv la bulgaraj esperantistoj ricevis admirindan donacon — la libron „Apostolo de libereco“ de angla aŭtorino Mercia MacDermott, tradukitan en Esperanton de la monde konata pacamiko Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM kaj honora membro de UEA. Temo de la libro estas la biografio de elstara bulgara revoluciulo de la tria kvarono de la 19-a jarcento Vasil Levski.

La apero de tiu ĉi libro prezentas gravan eventon de la Esperanto-movado, ĉar kiel skribas la aŭtorino en la antaŭparolo, „se Levski vivis kaj laboris en iu alia, pli granda kaj malpli nekonata lando, aŭ se li estus skribinta en iu pli vaste komprenata lingvo, li certe nun jam havus honrindan lokon en la internacia panteono de la revoluciuloj kaj liberigantoj“. Kaj jen nun lia biografio aperas en „pli vaste komprenata lingvo“. kian sendube prezentas Esperanto. La aŭtorino en postparolo de la Esperanta traduko tiel esprimas sian kon-

tenton: „Mi estas aparte feliĉa, ke „Apostolo de libereco“ estas tradukita en la internacian lingvon Esperanto ne nur pro tio, ke tiumaniere ĝi estiĝos alirebla por multe pli da legantoj tra la tuta mondo, sed ankaŭ pro tio, ke Levski mem estis granda internaciisto.“ Per tio ŝi esprimas ankaŭ sian favoran rilaton al Esperanto.

Vasil Levski antaŭ ĉio elstaras en la monda revolucia movado de la 19-a jarcento per trovo kaj efektivigo de tia ĝenerala grandskala revolucia organizo, per kiu li anticipis per kelkaj jardekoj la modernajn revoluciajn metodojn kaj kies formoj kaj maniero de aktiveco havas eĉ nun aktualan signifon por naciliberigaj movadoj. Li estis konsekvenca internaciisto, ĉiam emfazante ke la bulgaroj ne batalas kontraŭ la turka popolo, sed kontraŭ la sultana reĝimo, kiu subpremas ankaŭ sian popolon. Kaj li apelaciis ankaŭ al la turkaj laboruloj aliĝi al lia revolucia organizaĵo. Kaj kiam simplaj vilaĝanoj lin demandis ĉu post la liberiĝo li estiĝos reĝo de Bulgario, Levski respondis: „Se ni batalas por reĝo, ni estas stultuloj; ni ankaŭ nun havas sultanon“. La libereco laŭ li prezentas tute novan socian ordon — „puran kaj sanktan respublikon“, en kiu ĉiuj nacioj vivos pace kiel fratoj havante samajn rajtojn.

La vivo kaj la agado de Levski estis tiel heroo, tiel brava, ĉiam sub minaco pri aresto kaj li tiel lerte eskapis el la embuskoj kaj blokadoj transformigante jen en simplan paŝtiston, jen en karbovendiston, jen en riĉan komerciston, ke la priskribo de tiuj veraj epizodoj de lia vivo similas al legendoj aŭ al fantaziaĵoj en aventura romano. La aŭtorino ta-

men sin bazis nur al dokumentoj de turkaj kaj bulgaraj arĥivoj, al rakontoj de maljunaj homoj, kiuj auskultis rakontojn de atestantoj. Si tamen ne faris sekan kronikon de faktoj. Sia rakonto prezentas koheran bildaron pri spirite riĉa vivo, abnegacie fordonita por la patrolando, por la popolo, por la justeco. La aktivecon de Levski ŝi priskribas sur la fono de la tiutempaj cirkonstancoj en sklavigita Bulgario, ŝi majstre priskribas la ĉiutagan vivon de la popolo, ĝiajn kutimojn kaj morojn, ĝiajn strebojn kaj problemojn. Estas mirinde, ke eksterlandano tiel ĝuste povis enpenetri la animon de la popolo. Ĉio ĉi, la artaj priskriboj de la bulgara naturo, de popolaj festoj kaj interrilatoj inter la homoj alproksimigas la libron al belarta verko, kies legado alnajas la leganton per la interesa enhavo kaj ĉarma stilo.

La tradukinto N. Aleksiev havis nefacilan taskon, ĉar ja temis pri malnova epoko kun sia specifo, kun ofte arkaisma lingvaĵo, turkaj esprimoj, forgesitaj jam terminoj. Li tamen sukcese atingis la lingvan kaj stilan nivelon de la originalo. Lia stilo estas facile perceptebla, la leganto nenion perdas el la ĝuo, kiun liveras la legado de la libro. Por multaj tipaj esprimoj li trovis trafajn esperantajn ekvivalentojn, entute li strebis kaj sukcesis ĝuste transprezenti la bildocan rakonton de la aŭtorino. Aldonita glosaro faciligas komprenon de specialaj terminoj kaj esprimoj. Vere, estas allasitaj iuj eraroj, tie ĉi kaj tie — neologismoj, tamen ili ne estas en tia kvanto kaj kun tia signifo por difekti la impreson de tiu tre interesa kaj leginda libro. Ni forte rekomendas ĝin al ĉiu MEM-ano, al ĉiu esperantisto, ĉar krom ĉiuj priskribitaj ecoj, ĝi kontribuas al nia batalo por paco, internaciismo, kontraŭ ŝovinismo kaj rasismo, kontraŭ tiraneco kaj subpremo.

Violin Oljanov

*Mercia Mac Dermott, Apostolo de libereco. Tradukis Nikola Aleksiev. Sofia Pres, 1980, paĝoj 359. prezo ne indikita.

OPINIO DE LEGANTO

Mi estas simpla laboristo-seruristo. Mi havas familion, infanojn. Kiam mi ankoraŭ estis etulo, mia patro, forirante al milito kontraŭ faŝistan Germanion, diris: „Mi pereu, sed vi vivu en la mondo“.

Ĉu, sinjoro prezidento Ĉimi Karter, sen tiuj ĉi vortoj mortadis usonaj soldatoj en Ardenoj? Usonaj soldatoj, kiel mia patro, pereis, nenigante la faŝistan peston, por ke ĉiuj homoj vivu surtere en paco kaj amikeco.

Kaj jen sur la eŭropa kontinento, abunde superverŝita de popola sango, per via beno, sinjoro prezidento, oni timigas la popolojn per la mito pri „soveta danĝero“. Vi timigas per tiu popolo, kiu suferis ĉiujn teruraĵojn de la milito, per la lando, kie ĉiu homo pensas nur pri paco kaj ĉiu familio funebras pri la perdo de iuj siaj parencoj. Pri-


tiu ĉi malfeliĉa tempo memoras ankoraŭ la usona popolo. Kaj, ĉu ĝi, kiel ĉiuj popoloj sur la terglobo, bezonas la teruraĵojn de nuklea milito?

Mi dezirus, ke mian leteron tralegu usonanoj kaj ke ili diru, kiel parolas ni, sovetaĵoj: „Ne — al la armado, ne — al la nuklea milito!“

P. Siĉ

Urbo Jitomir, USSR)

Todor
Evgeniev



FISISTOJ

UN ELDONIS ESPERANTE

La Oficejo por Publika Informado (OPI) de la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko eldonis unuafoje la plej bazan dokumenton de UN, t. e. Ĉarto de UN kaj statuto de la Internacia Kortumo (34-paĝa; formato: 14 cm × 21,5 cm; 1980).

OPI, krome, reprenis la jam elĉerpitan alian dokumenton Universala deklaro de homaj rajtoj (unufolia), kies unua eldono okazis en 1976.

Ambaŭ dokumentoj, legindaj por ĉiu nuntempa internaciulo, estas akireblaj ĉe OPI (UN, New York, NY 10017, Usono).

(UN kaj NI)

ALVOKO AL ESPERANTISTAJ TRADUKISTOJ

Multaj esperantistoj agas en la kadroj de la internaciaj fakaj organizaĵoj. Ankaŭ esperantistoj tradukistoj devus grupiĝi por kunordigi la individuajn laborojn, organizi internaciajn kongresojn kaj seminariojn (en kunlaboro kun UEA kaj FIT — Internacia Federecaio de Tradukistoj publikigi artikolojn kaj verkojn pri la tradukarto).

Ĉiujn rimarkojn, proponojn, opiniojn kaj projektojn de regularo bonvolu sendi al jena adreso:

S-ro Zbigniew Czupkallo
PL 24-2-20 Nierzwica Duza
Pollando

INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO

Bulgario, 1090 SOFIO, p. k. 791 — tel. 32-40-68

PROGRAMO 1981 -- VARNA

1. APRILO	1—14	154	levoj
2. " "	16—29	154	" "
3. MAJO	3—16	182	
4. " "	17—30	182	
5. JUNIO	1—14	210	
6. " "	16—29	210	
7. JULIO	1—14	168	(gelernan- toj 11—14 aĝaj)
8. " "	16—29	168	(gelernan- toj 15—18 aĝaj)
9. AUGUSTO	1—14	168	(gestudentoj)
10. " "	11—30	200	(geinstruis- toj)
11. SEPTEMBRO	1—14	210	
12. " "	16—29	210	
13. OKTOBRO	1—14	182	
14. " "	16—29	182	
15. NOVEMBRO	1—14	154	
16. " "	15—29	154	
17. DECEMBRO	1—14	154	
18. " "	15—29	154	
19. DECEMBRO— JANUARO	29—2	100	(novjara balo)

KULTURA KAJ TURISMA PROGRAMO

- 1 tago — renkontiĝo ĉe flughaveno kaj stacidomo Varna. Transfero al la kursejo en Oraj sabloj kaj enloĝigo.
- 2 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Pieda ekskurso tra la regiono kun esperanto ĉiĉerono, ŝanĝo de mono 14—19 h.
- 3 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. kaj 14—19 h. Interkona vespero 20—23 h.
4. tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Busekskurso al Varna — vizito de etnografia muzejo kaj akvariumo 14—19 h.
- 5 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. kaj 14—19 h. Prelego pri Bulgario kun koloraj diapozitivoj 20 h.
- 6 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Busekskurso al urbo Balĉik—vizito de palaco de rumana reĝino.
- 7 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Piedira ekskurso al Alaĝa monahejo 14—19 h. Diskoteko 20—23 h.
- 8 tago — libera tempo
- 9 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Busekskurso al monumento Vlad. Varnenĉik kaj starigintaj ŝtonoj 14—19 h.
- 10 tago — esperanto kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. kaj 14—19 h. Prelego pri esperanto-movado kun koloraj diapozitivoj 20 h.
- 11 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Busekskurso al urbo Tolbuhin — vizito de etnografia muzejo 14—19 h.
- 12 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. kaj 14—19 h. Diskoteko 20—23 h.
- 13 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Piedira ekskurso al ripozloko „Drujba“ 14—19 h.
- 14 tago — esperanto-kursoj 8—11 h. Marbanado 11—13 h. Libertempo 14—19 h. Adiaŭa vespero 20—23 h.
- 15 tago — pretigo por forveturo kaj transfero al stacidomo kaj flughaveno. Adiaŭo. AŬTUNE kaj VINTRE la banado okazos en kovritaj basenoj kun natura varma akvo. La unua servo — vespermanĝo, la lasta servo — tagmanĝo. La kancelario de nia filio en Varna — str. Opalĉenska 23, tel. 2-25-46, 2-10-41

 **kores.
pondemuloj**

BULGARIO

4199 s. Trud, okr. Plovdivski, Mariana G. Gateva, 20-jara — pri fiziko, matematiko, literaturo, belarto, muziko.

4004 Plovdiv, ul. Asen Halaĉev 71, Kalina Konstantinova — 17-jara, pri muziko, belarto, literaturo kun homoj humursentaj.

USSR

Daiva Lelyte, Komjaunimo 8/17—28, 235 802 KLAIPEDA, Litova SSR, kolektas bk, memoraĵojn, diskojn

Jolanta Pakamoryte, GEDMINU 6—48
235 802 KLAIPEDA, Litova SSR, — pri muziko, arto, kolektas bk, memoraĵojn, diskojn.

Juznu Ukal, 454112, Ĉeljabinsk, Pr.-kt Pobedy 306, kv. 104 Saŝmin S. V. — 16-jara

Ĉerkasa klubo de internacia amikeco kaj solidareco en majo 1981 organizos ekspozicion de politika afiŝo, kiu kontribuas al la batalo kontraŭ la milito, por la tutmonda paco.

Ni turnas nin al ĉiu, por kiu estas kara la afero de paco kaj ni petas, helpu al ni en tiu nobla kaj grava aranĝo. Ni certe rekompencos la sendintojn.

Bonvolu sendi la afiŝojn al adreso:
258216 USSR, Ĉerkasa regiono, v. Levski, str. Hmelnickij 20, Rjabinin Viktor

Olga Balcevinik, 198217 Leningrad ul. III Internaciana d. 26, kv. 13 — studentino pri pentroarto — kun ĉ. 1.

KAMPUĈIO

Ni klopodas varbi kelkajn eminentulojn en Kampuĉio kaj laŭlando. Ni esperas ke post nelonge kampučaj kaj laŭlandaj esperantistoj partoprenos la venontajn MEM-konferencojn.

Jen por komenci bonvolu publikigi en diversaj nalingvaj kaj esperantaj gazetoj tiun adreson

Esperanto-Korespondservo
K-do **Pen You Leng**
Vice-prezident du Front (FUNSK)

Phnom Penh
Republique populaire du Kampuchea



Ĉu por pacaj celoj?..

Jaro XXVIII, No 1
Januaro-februaro, 1981

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov (Bulgario) — ĉefredaktoro
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
William Gilbert (Francio)
Oldrich Knichal (ĈSSR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Nguyen Hai Trung (Vjetnamio)
Boleslaw Staszczak (Pollando)

Lingva revizio: Asen Grigorov (Bulgario)
Arta aranĝo: Kiril Draĵev (Bulgario)
Korektis: Rajna Konstantinova

La redakcio atendas kontribuojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuon) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn mojn kaj adresojn en nacia lingvo! La redakcio ne sendas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI

Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabavka 1 vĥod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI Népköztársaság utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9, USSR
Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 BRUSSEL, Belgio.

Generala sekretario: William Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyōtō-ku, OSAKA, Japanio.

Ing. Angel Todorov, bul. Emil Markov, blok 37, II, 1404, SOFIA, Bulgario.

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, kv. Emil Markov, PK 66, 1404, SOFIA, Bulgario.

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Ĥristo Botev 97, 1303, SOFIA, Bulgario.

Centra kasisto (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76129 GRAND QUEVILLY, Francio (Poŝtkonto CCR — Rouen 102—45 p.).

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“ Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, Germana DR.

KIE ABONI?

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM Qld, 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200, WIEN, AuS. 100.

Belgio: Glady Claude, 36 Marne Str., 1030 BRUSSEL.

Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM, Louth, Lincs, LN 11, OPF. £ 4.—

Bulgario: Bulgara MEM-KOMITATO, bul. Ĥristo Botev 97, 1303, SOFIA 3 levoj

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jil-ska 10, 110 00 PRAHA 1. 30 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN. BRH. 35 d. kr.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN. 20 DM

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68 01610 VANTAA 61 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle, BP 23, F-54510 Tomblaine 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60 108 BERLIN.

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona). 750 pesetoj

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368, BUDAPEST 5, pf. 193 36 for.

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakura-gaoka 1209-98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo: Rufino Lopez, Havana Esp.-Rondo. Poŝtkesto 314, HABANA I.

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad, N-3155 TOROD.

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugaliao: Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C A-LISBOA 350 eskudoj,

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C, ap. 11 R-1900 TIMIȘOARA.

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj

Usono: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6,50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE:

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bul. Ĥristo Botev 97 (por „Paco“) El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.